# INTER★NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 208 Aŭgusto 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

## PRI LA PROGRAMO DE LA HEREDAĴA FOIRO

La Heredaĵa Foiro (angle "Heritage Fair") -programo estas trans-kanada, mult-komunikila, klereca iniciato sub la aŭspicioj de "Historika". La celo de la programo estas provizi oportunon por studantoj esplori, partopreni kaj lerni pri multaj diversaj aspektoj de siaj kulturoj kaj heredaĵo. Ĉi tiu aktiveco komencas je loka nivelo sub la aŭspicioj de la individuaj lernejoj, poste progresas al la regiona nivelo sub la aŭspicioj de la Regiona Lernejestraro, kaj post tiam la rezultoj de la penoj de la studantoj kulminas en Nacia Ekspozicio en elektita nacia urbo ĉiun jaron - la ĉi-jara elektita urbo estas Sudbury, Ontario.

La programoj de la Heredaĵa Foiro ebligis al gelernantoj prezenti siajn projektojn diversmaniere, per vidbendo, muziko, dancado, dialogoj, senmovaj montraĵoj, publikaj debatoj, dramo, komputilo, ktp aŭ kombino de iu ajn el la supre menciitaj manieroj.

La Heredaĵa Foiro invitas la komunumanojn, aliajn organizaĵojn kaj komercojn partopreni en la programo kaj disdoni sian ekspertizon kun niaj gejunuloj.

Dum la lastatempa Regiona Heredaĵo de Ŝignekto-Centra Regiono de Lernejoj (Chignecto-Central Regional School Board) kiu okazis en Truro, Nova Skotio, partoprenis 440 studantoj. Dudek kvin komunumaj reprezentantoj disdonis informon al la gelernantoj per instrukunsidoj kaj sesdek kvin juĝantoj engaĝiĝis pri la afero.

Krome, la programo provizis interŝanĝvojaĝojn por pluraj partoprenantoj de la Foiro. Ĉi-jare la Ŝignekto-Centra Regiono de Lernejoj povis ebligi dek unu partoprenantojn el Lethbridge, Alberto kaj ankaŭ aliajn dek unu el Shawville, Kebekio viziti nin kaj montris siajn projektojn dum la Foiro. Dudek du parto-prenantoj el nia regiono reciproke vizitis Lethbridge kaj Shawville post la Foiro.

Konsidere c\ion, ĉi tiu programo, kiu naciskale ampleksiĝas, ebligas nin malfermi pordojn por niaj geknaboj, konsciigi ilin pri nia mirinda heredaĵo kaj doni al ili oportunon por fari ligajn interrilatojn trans ĉi tiu nia granda nacio.

El persona perspektivo, mi vidas ĉi tiun programon kiel bonegan ekzemplon por la evoluado de respekto kaj admirado por junuloj kun niaj pliaĝuloj.

— Shirley Nicoll, kunordiganto de la Ŝigneko-Centra Heredaĵa Foiro (Junio 2003) (tradukis Kim Keeble)

## La Sepa Heredaĵa Foiro - 2003

Ankoraŭfoje dum majo mi gvidis du instrukunsidojn pri Esperanto dum la ĉi-jara Heredaĵa Foiro ĉe la Komunuma Kolegio de Nova Skotio en Truro. Mi instruis dek kvin geknabojn dum la matena kunsido, kaj ok dum la posttagmeza. La posttagmeza grupeto pli interesiĝis pri Esperanto ol la matena grupo, kaj tre bone lernis. Ĉiu kunsido daŭris nur 45 minutojn. Dum tiu tempo, mi instruis al la geknaboj la numeralojn, la alfabeton, la kanteton „Ruĝa Pomo", kaj kiel saluti, adiaŭi kaj diri kelkajn utilajn esperantajn frazojn. Mi parolis pri la Pasporta Servo kaj iomete pri la historio de la Esperanta Movado.

Dum la posttagmeza kunsido, post eble dudek kvin minutoj de instruado, tri gravuloj de la Foiro vizitis nin por observi. Mi petis, ke la geknaboj kantu la jam lernitan kanteton „Ruĝa Pomo" kaj ili tre bone kantis ĉiujn tri strofojn de la kanto. Tio iomete surprizis la gravulojn, mi opinias, ĉar ili sciis, ke antaŭ dudek kvin minutoj tiuj samaj infanoj sciis nenion pri Esperanto. Tiu grupeto estis vigla kaj lerta kaj multe demandis pri Esperanto. Mi tre ĝuis tiun sperton kun ili.

Tuj post la posttagmeza kunsido, tri virinoj (kiuj sidis en la ĉambro kaj observis la tutan kunsidon) parolis al mi pri la instruado de Esperanto al infanoj. Ili estis la patrinoj de iuj infanoj de la grupeto. Unu patrino estis ano de la Hejma kaj Lerneja Asocio de Rawdon-a Distrikta Lernejo kaj ŝi volis scii, ĉu mi instruus Esperanton al la studantoj en tiu lernejo. Mi diris al ŝi ke mi jam proponis, ke mi instruu Esperanton en tiu lernejo, sed ŝajnis ke tie ne estis intereso pri tio. La

virino diris, ke ŝi sondos la aferon kaj kontaktos min aŭtune sed, kompreneble, mi jam aŭdis tiujn vortojn kelkfoje, do mi ne retenos la spiron ĝis aŭtuno. Tamen, mi ĉiam esperos.

— Kim Keeble

## ĈE OTAVA ESPERANTO-PRINTEMPO

Meze de majo, mi havis la bonŝancon ĉeesti parton de la regiona esperantista renkontiĝo en Otavo. Mi flugis el la tro varma, somera sekeco de Nova Meksiko (parto de Usono jam de pli ol 150 jaroj), al la freŝa, printempa, verda kaj belega ĉefurbo de Kanado (parto de Kanado, preskaŭ same longe). Same verda kaj belega estis la renkontiĝo kun preskaŭ dudek esperantistoj el Ontario, Kebekio, kaj Otavo mem. Surprize malmultaj de tiuj lastaj.

La elstara esperantista transportoservo venis al mia loĝejo du minutojn post mia telefonvoko per nova, okulfrape flava, radio-sendita, satelite gvidita aŭto, kies ŝoforo, Arono, sperte gvidis nin al rendevuo kaj manĝo apud lageto. Tie, ni ludis, manĝis, kaj denove ludis ĝis preskaŭ noktomezo. Estas impone al mi renkonti tiom da viglaj, amuzaj, kreemaj kaj amikemaj esperantistoj dum semajnfina, regiona renkontiĝo. Por mi, hejme, la sola maniero renkonti aliajn esperantistojn ene de 500 kilometroj, estas resti en la propra urbo.

La vetero kunlaboris por permesi plaĉan turismadon. Mi finis la semajnfinon kun belaj memoroj kaj novaj amikoj, kiujn mi ŝatus vidi denove. Mi esperas ke mi povos simile ĝui la regionan renkontiĝon venontjare. Kie ĝi okazos? Ĉu eble iom pli proksime al Nova Meksiko?

Derek Roff
Albuquerque, Nova Meksiko
derek@unm.edu



## FLUGU ALTEN, STRIGETO!

Saĝa maljuna strigo konsilas ke, se oni flugas malsupren laŭ longa ŝtuparo, oni nepre uzu la flugilojn. Antaŭ monato ni ricevis la ŝokan novaĵon, ke brita birdo – nia kara Marjorie B., la ne-aglo-okula – lastatempe ne uzis flugilojn flugante malsupren en glasgova hotelo, kaj damaĝis multon pli ol la fieron! La vundito tamen, kiel fenikso, revenis de la malsanulejo por plenumi siajn devojn je la skota kongreso. ***Inter Ni*** multe bedaŭras la dolorojn de kurbiĝintaj plumoj kaj forte esperas, ke nia brita strigeto baldaŭ resaniĝas.



— La redakcio de ***Inter Ni***.